SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

N-ro 5/1996 SEPTEMBRO-OKTOBRO

## DONACOJ AL SES KAJ AGADO 2003

En la unua duonjaro de 1996 SES ricevis la jenajn donacojn:

**Donacoj por SES**

J. Hasler 15.- , M. Sormani 15.- , A. Veith 15.- , E. Glättli 15.- , D. Bühlmann 40.- , D. Bertolini 60.- , W. Laeserach 50.- , H. Sandmeier 15.- , L. Schaerer 15.- , Nekonato 50.- , P. Rüegg 40.- , D. Bühlmann 100.- , W. Schaufelberger 5.- , A. Koller 15.- , D. Lambercy 15.- , G. Gacond 25.- , H. Renard 15.- , E. Walder 15.- .

**DONACOJ POR AGADO 2003**

H. Wettstein 30.- , V. Mock 15.- , L. Benoît 35.- , C. Gacond 25.- , N. Margot 60.- , J. Mamin 50.- .

SES kore dankas por la valora helpo.

oo0oo

## G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**
En Altersheim Neubad.
26.9.20.00h MONATA KUNVENO: Raportoj pri ferioj kaj ludoj.
24.10.20.00h MONATA KUNVENO: Raportoj pri la universala kongreso en Prago, kaj familia rentkontiĝo en Bratislava.

**BELLINZONA:**
Ni kunvenas ĉiam la duan sabaton en Viale Motta 32, Bellinzona.
14.9.17.00h kaj 12.10.17.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
3.9.19.30h kaj 1.10.19.30h.

**ESPERANTO-RONDO BIELO:**
En restoracio migros, Neumarkt, Bielo 3.
ĉiun ĵaŭdon 18.00-19.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" GENÈVE:**
En Institut National Genevois, Promenade du Pin 1, subteretaĝo, haltejo Athenée, Busoj 3 kaj 5.
13.9.19.00h MONATA KUNVENO.
8.10.19.00h MONATA KUNVENO:

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO/LES:**
En restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8 en Emmenbrücke, kun escepto de BIG BEN.
11.9.14.00-16.00h Paroliga kunveno en BIG BEN. Gvido Franz Brügger.
26.9.20.00h MONATA KUNVENO: Ludado per kartoj, enigmoj ktp. Gvidos Franz Brügger.
24.10.20.00 MONATA KUNVENO: Raporto pri la UK en Prago.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ni kunvenas ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio schweizerhof, Untere Bahnhofstrasse 18.
11.9.20.00h MONATA KUNVENO: Raportoj pri la 48-a IFEF-Kongreso en Den Haag. Parolos s-ino Sennhauser kaj Ernst von May.
9.10.20.00h MONATA KUNVENO: Temo elektota.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**
En la propra kunvenejo en Eisengasse 22.
9.9.19.15h MONATA KUNVENO:
23.9.19.15h Publika informvespero pri Esperanto.
30.9.19.15h Lingvaj ekzercoj kaj libera kunveno
5.+6.10. kaj 19.+20.10. Esperanto-intensiv-KURSO POR KOMENCANTOJ: (Sab+Dim)
14.10.19.15 MONATA KUNVENO.
28.10.19.15 Lingvaj ekzercoj kaj libera kunveno.

oo0oo

**A D R E S - Ŝ A N Ĝ O J !**

Necesas ree foje memorigi al kiu oni povas (aŭ nepre devas) sendi adres-ŝanĝojn.Estas tio **Sinjoro Ernst von May, Flurstrasse 3, 9242 Oberuzwil, (TEL: 071/951 61 30).**
Li traktas tiajn informojn.
Membroj, kiuj translokiĝas, bonvolu memori pri tio. -FL-

oo0oo

**ek al Bavario –**
**... la 13-a vokas vin !**

*... la populara vintra arango kun lastjare pli ol 170 aliĝintoj el 18 landoj*

**13-A**
**INTERNACIA**
**FESTIVALO**

**27 dec '96 – 3 jan '97**

*por junaj familioj kaj personoj 25-55 jaraĝaj*

**W Ü R Z B U R G** (Germanio)

Internacia Festivalo prezentas specifan programom por mezaĝuloj (dua generacio) kaj (junaj) familioj kun aŭ sen infanoj. IF okazas sub profesinivela gvido kun internacia teamo. Atentu: IS junulara arango de GEJ okazas samtempe, sed ne samloke. La klerigejo (Jugendgästehaus) kun centra situo (nur 5 min. precipe al malnova urbo kaj centro) kaj malsupre de urba kastelo, disponas pri 1 ĝis 5-litaj ĉambroj kun (parte) rigardo al kastelo/malnova urbo. **denove je via dispono: nia etosoplena gastejo .**
Würzburg, la fama universitata urbo kun multaj barokaj preĝejoj, romana katedralo, bele restaŭrita malnova urbo kaj mezepoka (kun sanktulaj figuroj) rivera ponto, kiun vi uzas promenante al centro, kun iama rezidejo de princepiskopoj (UNESKO-kultura heredaĵo) kaj pilgrimejo, estas nordbavara (frankonia) urbo, centro de vino kaj biero. Bonegaj konekto-ebloj aŭtostrataj kaj fervojaj. Aventage estas senkosta transporta servo de stacidomo al IF-ejo.

---

**I N T E R N A C I A   F E S T I V A L O**

# SVISA ESPERANTO-SOCIETO (SES)
# LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO (LES)

↓

kore invitas vin al la

**Kultura Semajnfino en Lucerno**

sub la moto:

**NOVAJ VOJOJ EN LA KOMUNIKADO**

kaj por perfektigi en Esperanto
sabate kaj dimanĉe
la 9an/10an de nov. 1996

**LUZERNER ESPERANTO-GESELLSCHAFT**

lädt Sie herzlich ein zum


**Kulturellen Wochenende in Luzern**

um Esperanto und auch seine kulturelle Bedeutung kennen zu lernen.

Samstag und Sonntag,
9./10. Nov. 1996

en la hotelo STEGHOF, Voltastrasse 2, CH 6005 Lucerno
tel. 041 360 43 43, fakso 041 360 77 81

La apuda mapeto montras al vi la trolejbusan vojon - bus-linioj nro 4 + 5 (streketoj) - de la stacidoma placo ĝis la stacio Steghof.
(Bilet-aŭtomatoj troviĝas ĉe la stacioj,ne en la busoj)
Piede, laŭ Zentralstrasse, Bundesplatz, Neustadtstrasse,
vi bezonas 10 minutojn.



## Programo / *Programm*

| | | |
|---|---|---|
| Gruppe A: | *Anfänger-* Komencantoj. | *Nicole Margot, Lehrerin, wird Sie mit dem genialen Esperanto vertraut machen.* Instruas: Nicole Margot |
| Grupo B: | Progresantoj. | Claude Gacond igos vin perfektiĝi en nia lingvo. |
| Grupo C: | Pri la ĉeftemo | „Novaj vojoj en la komunikado" prelegos el pluraj vidpunktoj kaj al pluraj direktoj jenaj personoj: |
| Dietrich M. Weidmann, lingvosciencisto | | : Ĝenerala superrigardo, speciale: „Kian rolon ludu Esperanto en la nova komunikado?" |
| rolfo (Rolf Ernst), inform-dezajnisto | | :„interreto" La mondvasta komunikado! |
| Telekomunikad-specialisto | | :„Futuraj aspektoj + hardwaro pri la komunikado" (germanlingve, tradukas Rolfo) |
| Ernst Glättli,iama fervojisto | | :„Futuraj aspektoj en la fervojoj" |
| Claude Gacond, pedagogo | | :„Prezento de la instru-afiŝoj kaj de la verko Didaktikaj Konsiloj" |

## Horaro / *Stundenplan*

| SABATO | | DIMANĈO | |
|---|---|---|---|
| 15h00 | inaŭguro | 09h30 | libroservo |
| 15h30 | komenco A/B/C<br>**C1** D.M.Weidmann | 10h00 | A/B/C<br>**C3** Telekomunikad-specialisto |
| 16h15 | paŭzo | 10h45 | paŭzo |
| 16h45 | A/B/C<br>**C2** Rolfo Ernst | 11h00 | A/B/C<br>**C4** Ernst Glättli |
| 17h30 | libro-servo | 11h45 | paŭzo |
| 18h30 | vespermanĝo | 12h00 | **C5** Claude Gacond<br>–> por ĉiuj |
| 20h00 | distra vespero | 13h00 | fermo |
| | | 13h15 | ebleco tagmanĝi |

**Organiza sekretario / *Sekretariat***

Sonja Brun, Waldeggstrasse 28, CH 6343 Rotkreuz, tel. 041 790 46 40

*Die Anmeldung gilt nach Erhalt Ihres Beitrages, der Fr. 40.-- beträgt (Studenten + Schüler Fr. 15.--)*
*Bitte bezahlen Sie mittels beiliegendem Einzahlungsschein auf das Postcheckkonto 60-14540-0 LES Svisa Esperanto-Kongreso Luzern bis spätestens am 20. Oktober 1996. Danke!*

Ĉiuj monsumoj estas en svisaj frankoj (CHF).
La kotizo estas CHF 40.-- (por studentoj CHF 15.--).
Via aliĝo validos post la pago de la kotizo. La kotizon vi bonvolu ĝiri al la pĉk: 60-14540-0 LES Svisa Esperanto-Kongreso Luzern ĝis plej malfrue la 20an de oktobro 96, per la aldonita poŝt-enpagilo. Dankon!

----- ✂ -------------------tranĉu kaj sendu en kuverto------------------- ✂

**Aliĝo / Mendo** **Anmeldung / Bestellung**

fam. nomo/N.. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .pers.nomo/Vorn. . . . . . . . . . . . . . .
Adr.+loko/*Ort* . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . tel:. . . . . . . . . . . . .

Mi partoprenos en la grupo / *Ich nehme teil in der Gruppe*

A B C ☐ sabate/*samstags* ☐ dimanĉe / *sonntags*

| (prezoj en svisaj frankoj) | prezoj | mendoj |
|---|---|---|
| -kotizo / *Beitrag* (infanoj senpage) | 40.-- / 15.-- | . . . . . . . . . . |
| -sabata vespermanĝo (substreku) | | |
| menuo nro 3, nro 4, aŭ veg. | 17.-- | . . . . . . . . . . |
| salato 6.--, deserto 6.-- | ( 6.--) | . . . . . . . . . . |
| Ĉiuj ĉambroj kun banujo aŭ duŝo, necesejo, radio kaj televidilo: | | |
| -unu-lita ĉambro } kune kun matenmanĝo | 70.-- | . . . . . . . . . . |
| -du-lita ĉambro } kune kun matenmanĝo | 120.-- | . . . . . . . . . . |
| -tri-lita ĉambro } kune kun matenmanĝo | 150.-- | . . . . . . . . . . |
| -kvar-lita ĉambro } kune kun matenmanĝo | 180.-- | . . . . . . . . . . |
| Kun mi en la sama ĉambro loĝas: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | Entute | |

Dato/*Datum* . . . . . . . . . . . . Subskribo/*Unterschrift* . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Menuoj por la vespermanĝo (1 telero) Fr. 17.00

| | |
|---|---|
| nro 3 | Panerumita porka steko (120g), fritítaj terpomoj, pizoj kaj karotoj. |
| nro 4 | Trancita bovaĵo (120g), nudeloj, fazeoloj. |
| veg. | vegetara Mah Meh aŭ legomo-plado. |

(la numeroj 3 kaj 4 konvenas al la hotela menu-listo)

✂-------------------------tranĉu kaj sendu en kuverto-------------------------✂

bonvolu afranki
*bitte frankieren*

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO
S-ino Sonja Brun
Waldeggstrasse 28
CH 6343 Rotkreuz

## Varbado - Novaj iloj

Tio jam estas konata en esperantio: varbado estas la sola maniero kreskigi la nombron de esperanto-parolantoj (krom naski ilin...). Tiucele la komitatanoj de JES iom post iom prizorgis novajn varbilojn, ĉu originalajn, ĉu adaptitajn, kaj nun ni disponas pri sufiĉe kompleta elekto, kiu estas je via dispono!

JES nun prizorgas en la franca kaj germana lingvo:
- ĝeneralan prezenton de la fenomeno esperanto (1-paĝa) (ankaŭ en la itala kaj aliaj lingvoj)
- "gramatikan" prezenton de la lingvo (1 faldfolio) (ankaŭ en la itala)
- prezenton de JES kaj ĝiaj aktivecoj (1 faldfolio)
- afiŝon okulfrapan sen mencio de speciala evento (en la germana: "Jedes Land ist interessant... Esperanto - die Sprache"; en la franca: "Le meilleur moyen de goûter aux langues étrangères")
- afiŝon sen teksto, kie estas spaco por anonci kurson, ktp

# AGADO 2003: ALVOKO DE LA PREZIDANTO

De jaro al jaro proksimiĝas la dato de nia jubileo. Svisa Esperanto-Societo festos sian centan datrevenon en la jaro 2003, kaj ĝi bezonos investi gravan sumon, ekster la propra kapitalo, se ĝi volos samtempe gardi la nunan financan ekvilibron kaj digne rememori pri sia unua jarcento. Tial naskiĝis AGADO 2003: tial ni petas vin kontribui al ĉi tiu speciala jubilea fonduso.

Svislando ludas esencan rolon en la historio de Esperanto kaj interlingvistiko. En Svislando naskiĝis famaj pioniroj, kiel Hector Hodler kaj Edmond Privat, kiuj fondis Universalan Esperanto-Asocion en Ĝenevo. Al Svislando referencis, pro sia origino aŭ pro sia ŝtataniĝo, gravaj verkistoj kiel fratoj Cezaro kaj Reto Rossetti, kiel Arthur Baur, kiel Claude Piron, kiel Giorgio Silfer. Svislando estis ĉiam en la unua vico rilate la metodikon de la esperanto-instruado: de Pierre Bovet ĝis hodiaŭ. En Svislando situas kelkaj el la plej gravaj institucioj de la nuna Esperantio: KCE, CDELI, LF-koop, Esperanta PEN, Akademio de Esperanto. Svislando havas unu el la plej longaj tradicioj de esperanto en radioelsendoj. Ses Universalaj Kongresoj okazis en Svislando: nur Britio gastigis pli multe. Kaj tiel plu, kaj tiel plu...

Sen Svislando, Esperantio havus multe malpli riĉan historion – aŭ tute alian historion. Kaj SES, per sia historia kontinueco, estas la plej digna atestanto de tiu evoluo.

Ĉu vi ne deziras rememorigi ĉion ĉi, okaze de la centa datreveno de via Societo? Vian donac(et)on sendu al: Fonduso AGADO 2003, SKA-konto 653677-40-1.

---

Daŭrigo de paĝo 8.

Tiujn varbilojn ni klopodas uzi en diversaj okazoj (ĉe ekspoziciaj budoj, ĉe lernejoj, afiŝoj en bibliotekoj...) sed ankaŭ VI povas sukcese uzi ilin. Kaj eĉ se vi ne volas eki grandan kampanjon, ĉiam estas utile havi ion por montri se iu faras demandojn al vi... Do simple mendu laŭ via elekto; eblas ricevi stoketon de ĉiuj menciitaj varbiloj, aŭ blankan originalon por mem kopii (aŭ ambaŭ!). Ek al la fina venko!

mendadreso: Marion Grosjean, Serre 28, 2300 La Chaux-de-Fonds

lingvogvidilo

# esperanto - nepalio

# एस्पेरान्तो - नेपाली

Verkis : Razeno Manandhar, P.O. 3447, Kathmandu, Nepalo

NEPALIO la ekzotika lando apud la Himalajo estas fama en la mondo pro ĝia diverseco laŭ multaj aspektoj, diversaj religioj harmonias tie kaj fluas diversaj koloroj de kulturaj fenomenoj, kiuj apartenas al multaj etnaj grupoj, kun sama rapido, kune, similas al bela ĉielarko. Riĉa arto kaj arkitekturo en la valo de Katmando allogas lertajn okulojn kaj popola muziko tiras atenton de spertaj oreloj. Krome la riĉa panoramo de la Himalajo hipnotigas naturamantojn kaj ili eksonĝas kun malfermaj okuloj, kiam la suno brilas. (Detaloj riceveblaj ĉe la supra adreso).

oo0oo

LA ANGLA LINGVO ENVADAS SVISAN ORGANON DE JUNULAR-GASTEJOJ:

Ĉiuj titoloj kaj multaj subtitoloj de tiu revuo estas en la angla. Ĝia eldonkvanto estas 80'000 ekz, 5foje jare.
Mireille Grosjean (Les Brenets) reagis en aprilo 1996 sed ricevis neniun respondon.

-MG-

oo0oo

## M O R Ṭ - A N O N C O

La 30-an de julio mortis, 92-jara, nia kara samideano kaj amiko René William Perrenoud. Dum la ceremonio la 2-an de aŭgusto 1996 , kiun partoprenis Claude Gacond kaj la membroj de nia neŭŝatela societo, la religia deĵoranto sufiĉe longe parolis pri la ĉefaktiveco de nia kara mortinto pri Esperanto. Mi mem parolis esperante kaj tradukante franclingven, diris kiel nia amiko estis konvinkita, fervora kaj oferema esperantisto. Li instruis la lingvon kaj ludis eminentan rolon en la svisa movado, speciale en la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, kaj li opiniis, ke ni kredas al la solvo de nia lingvo, en la problemo de la baro de la lingvoj.

Salutas vin kore kaj amike

via Alfred Wenger-

oo0oo

## I N F O R M O

La protokolo de la ĝenerala kunveno de la Svisa Esperanto-Societo 1996 kaj la nova statuto aperos en SES INFORMAS 6/1996.

oo0oo

PP
8053 Zürich

---

## SENPAGA KONGRESA NUMERO DE "HEROLDO"

Se vi deziras ricevi senpage la duoblan kongresan numeron de "Heroldo de Esperanto" kun riĉe ilustrita raporto pri la Universala Kongreso en Prago, skribu simplan poŝtkarton al la redakcio: Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale, Italio; aŭ sendu al ĝi telefakson (+11 226 30 78) aŭ retmesaĝon (giancarlo.fighiera@torino.alpcom.it).

Kiel vi scias, "Heroldo" estas la plej populara sendependa internacia periodaĵo en Esperanto; ĝi aperas de 1920 kaj eldonas 16 numerojn jare. La sama gazeto publikigis ankaŭ la plej famajn lernolibrojn, inter kiuj "Paŝoj al plena posedo" de W. Auld.

oo0oo

**ANTAŬANONCO:**
La 13-a PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA okazos de la 28-a de marto ĝis la 4-a de aprilo 1997 en DUDERSTADT, Germanio. Detala programo ricevebla ĉe la redakcio de SES INFORMAS.
-FL-

---

Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 6/96 estas la 7-a de oktobro 1996.

---

**Red-Adreso: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich. Tel: 01/381 77 13**